

«Kulturaj Kajeroj ne similas, ne similos al aliaj revuoj.»  
Henri Micard.



1958... 1959... 1960...

Esperanta kulturo estu ĉies verko!  
Ni ĉiuj kune nur kreadu.



Kulturaj Kajeroj, 2008, n° 1-2. – 2 €.  
Editeur : Maison culturelle de l'Espéranto, château de Grésillon, 49150 Baugé, France.  
Directeur de publication : Dominik Bertrand.  
Imprimeur : Dominik Bertrand, M.C.E., château de Grésillon, 49150 Baugé, France.  
Dépôt légal juin 2008. ISSN 1272-5188

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

# KULTURAJ KAJEROJ

Volumo 42 – Jaro 2008 / Numero 1-2 (215-216) – Januaro-junio



**2008 1-2**

## Abonu la Kulturajn Kajerojn por 2008

### 1a paŝo :

Informu pri la poŝta adreso, kien ni sendu la revuon, al  
Dominik Bertrand, 7, rue des Brûlis, 77320 Jouy-sur-Morin, France  
« nasf2008@orange.fr »  
aŭ al peranto.

### 2a paŝo :

Pagu 10 eŭrojn, precizigante por kiu vi pagas, al  
« Maison culturelle de l'Espéranto »  
dum via venonta vizito al Greziljono  
aŭ al peranto.

### Atentu :

Komence de jaro ni ne plu sendos la revuon al tiu, kiu ne pagis sian  
ĵus pasintan jaron.



## Perantoj

Ni serĉas novajn perantojn en ĉiuj landoj.  
Helpu nin !

## 1958 - 2008 Juna Steleto revenas !

**S**ALUTON ! Mi nomiĝas Steleto, mi estas juna staĝano en Greziljono.  
En 1952 mi estis jam juna, kiam centoj da samideanoj kun Henri  
Micard kunigis siajn fortojn por aĉeti kaj pretigi la kastelon kiel  
kulturdomon.

Mi vizitadis la staĝojn por lerni la internacian lingvon. Tiam mi  
malkovris la mirindan riĉecon de la Esperanta kulturo kaj tra  
renkontoj en la kastelo kaj tra legadoj.



Romanoj kiel la Alaska Stafeto (1) pasiigis min per aventuroj, kies  
influo instigis min dum ludoj ekkrii kiel la juna heroo : « Ni aranĝu  
stafeton ! »

Revuoj venis el la tuta mondo. Eĉ kelkaj kreiĝis dank' al Greziljono.  
Henri Micard gvidis plurajn : *Esperanto Lernejo* (1936-1952) ; *Esperanto  
kaj Kulturo*, *Espéranto et Culture* kaj *Internacia Pedagogia Revuo* (1952-  
1957) ; kaj en 1958 *les Cahiers de Grésillon*.

Tiu ĉi lasta dulingva revuo naskiĝis ekzakte antaŭ 50 jaroj!

Post 1958 *les Cahiers de Grésillon* iĝis *Kulturaj Kajeroj* kun interna franclingva folio titolita *la Vie de Grésillon*.

Lanĉis la revuon Henri Micard, sed ja Pierre Babin senĉese laboris por aperigi ĝin dum pli ol kvardek jaroj. Finfine en 1999 la redakcia komitato skribis:

« Venis nun la tempo por la redaktantoj rezigni pro la aĝo. Neniu sin proponis por pluvivigi *Kulturajn Kajerojn*. Tio estas granda bedaŭro de tiuj, kiuj ĝis nun prizorgis ĝin. La abonantoj bonvolu pardoni ilin pri tiu fortranĉo de la fadeno, kiu ligis ilin reciproke. Sed ni tamen esperu! La titolo ankoraŭ ekzistas kaj, eble, nova skipo decidis preni sur siajn ŝultrojn tiun laboron kelkfoje pezan sed plej ofte agrablan, riĉigan, fonton de grandaj plezuroj (2). »

« Ni aranĝu stafeton! » mi respondu.

Tekstoj, fotoj, paĝoj... pretiĝis en somero 2007. Ili konsistigu unuan kajeron. Do ek! Alten la torĉo!

Vivu Esperanta kulturo! Pleniĝu *Kulturaj Kajeroj*!

Vi ĉiuj helpu min. Mi volas ankoraŭ amuziĝi. Mi ne volas dormi plu! Do verku, revu, kreadu... min.



(1) Omelka F., *la Alaska Stafeto*, The Esperanto Publishing Company, 1952.

(2) Teksto fama ĉar parte citita de *la Ondo de Esperanto*, 2000, n° 4 (66).

## Kulturaj Kajeroj

### JARO 2008, NUMERO 1-2

#### HISTORIO DE LA KULTURDOMOJ

- Sub la granda kverko de Greziljono ..... p. 4  
*Unu semajno en Greziljono; Ludi kaj lerni; Kantu! Dancu!;*  
*Por neniam akcenti fuŝe; Unu semajno en Greziljono; La*  
*Trafa Kurso de Rafaelo; Staĝo pri komputiko.*

#### KLERIĜADO

- Filozofio : *Lingva Estonteco de la homaro* ..... p. 20  
 Geografio : *Mia Brazilo* ..... p. 23  
 Tekniko : *Funkciado de la greziljona batpumpilo* ..... p. 25

#### DISTRIĜADO

- Poezio : *Hajkoj* ..... p. 29  
 Enigmoj : *la Matena Enigmo; la Transa Enigmo* ..... p. 31

Unua eldono laŭleĝe deponita en Francio en junio 2008. ISSN 1272-5188

Direktoro de la revuo : Dominik Bertrand.

Redakcia Komitato : Dominik Bertrand, Nina Korĵenevskaja, Guy Martin.

Korektintoj : Nina Korĵenevskaja, Christian Rivière.

Verkantoj : Marie-France Antoine, Dominik Bertrand, Pablo Busto González, Francisca Calejari, Denez Cornichet-Lefol, Joëlle Corroy, Bernadet Dešanel, Olivier Duroselle, André Fabre, Lucie Hulot, Jean-Luc Kristos, Franjo Levêque-Provost, Guy Martin, Marie-Noëlle Merlay, François Randin, Rose-Marie Sommacco, Juanita Turbillon kaj Bernard Ciret pro la malnovaj desegnoj pri Steleto.

# Unu semajno en Greziljono

Inter la 7<sup>a</sup> kaj la 14<sup>a</sup> de julio 2007.



**L**A SOMERAJ kulturaj staĝoj de 2007 en Greziljono disvolviĝis dum ses unusemajnaj periodoj. Ni priskribas en tiu ĉi kajero ĉefe la unuan kaj la lastan semajnojn, hazarde elektitajn kiel ekzemplojn.

Komence de la somero gvidis :


- italo Carlo Bourlot kurson pri baza Esperanto per duonrekta metodo kaj per lernolibro de Claude Piron, *Gerda malaperis*;
- Jean-Luc Kristos kurson per komunikado ĉiutaga en etoso ĝoja, ludema kaj feriera (p. 6);

- usonano Steve Wagenseller seminarion pri historio de teatro, kun legadoj kaj diskutadoj (tre certe aperos pli da detaloj en venonta kajero).

Multaj staĝanoj partoprenis kroman aktivaĵon de Franjo Levêque-Provost : kantadon kaj kursetojn pri voĉ-laboroj, por poste pli glate paroli Esperanton. Jeanik Marolleau ĉiĉeronis niajn turistojn tra la tuta regiono. La semajna restado estis tre agrabla al ĉiuj ankaŭ dank' al pliaj sindonemaj volontuloj : Brigitte kaj André Bourdet, Francisca Calejari, Francine Bounhoure kaj aliaj...

Partoprenis ĉirkaŭ 20 lernantoj, do entute ĉeestis ĉirkaŭ 30 samideanoj. Ĉu pro tiu tro eta nombro seniluziiĝus Henri Micard? Certe ne, ĉar, kiel li ŝatis, dum la tuta semajno (kaj poste dum la tuta somero) la abelujo senĉese zumadis pro multaj Esperantaj aktivadoj.

Pro la komuna foto pozas Jeanik Marolleau (1), Elizabet Barbay (2), Véronique Lemoine (3), Guy Brochard (4), Jean-Yves Grille (5), Jean-Pierre Ducloyer (6), Franjo Levêque-Provost (7), Guy Martin (8), Francisca Calejari (9), Geneviève Marx (10), Josette Ducloyer (11), Edmond Margot (12), Marie-Noëlle Merlay (13), Steve Wagenseller (14), Jean-Luc Kristos (15), Lucie Hulot (16), Paola Giommoni (17), Phil Guichet (18), Justine Ralalarisoa (19), Carlo Bourlot (20), Brigitte Bourdet (21), André Bourdet (22), Laura Gentili (23).



# Ludi kaj lerni

Verkis Guy Martin.

**T**RO OFTE oni diras, ke oni devas elekti : ĉu lerni, ĉu ludi ?  
Sed en Greziljono dum la unua julia staĝo de 2007, jes ja ni povis, eĉ ni devis ludante lerni. Pluraj fotoj atestas, ke multe da staĝanoj tute sukcesis. Plie ni lernis ne nur en la kursoj, sed ankaŭ dum manĝotempoj, vesperoj, eĉ noktoj en la trinkejo.

Ĉefe Jean-Luc Kristos proponis kurson, en kiu ni ĉiam ludis. Li uzis ludojn el « Edukado.net », kaj inventis aliajn ludilojn.

## Ludu kun « si »

Li klarigis la « grama-tiklon » pri « si » per koloraj paperfiguretoj. Verda knabino, blua knabo kaj flava ĉevalo posedas verdan pupon, bluan pilkon kaj flavan karoton (foto 1). Oni povas ŝovi la posedaĵon en la figureton. Poste oni povas paroli pri ĉiu figureto : la verda knabino ludas per *ĝia* karoto aŭ brakumas *sian* pupon. La flava ĉevalo ne manĝos *ŝian* pupon sed preferas *sian* karoton.

## Vizitu la urbon

Duope la gelernantoj uzas mapon de urbo. Unu posedas mapon kun indikoj pri dek lokoj ; la dua uzas alian mapon kun indikoj pri dek pliaj lokoj.




Foto 1. – Jen maldekstre verda knabino, meze blua knabo kaj dekstre flava ĉevalo.

Unu post la alia, alvenante en la stacidomon, ni devas saluti loĝanton de la urbo kaj peti de li klarigon por atingi lokon, kiun ni elektas. La alia klarigas la taŭgan vojon, precizigante la direkton, la trapasotajn stratojn...

La dialogo daŭras, ĝis kiam ambaŭ ludantoj atingos la dek cel-lokojn.

## Priskribu desegnojn

Ĉiuj vidas naŭ numeritajn desegnojn, kie ardeo estas en akvo kaj fiŝkaptas aŭ manĝas fiŝon, apud junko (foto 2).

Unu post la alia, ĉiu sekrete elektas desegnon kaj detale priskribas ĝin. La aliaj provas diveni pri kiu li aŭ ŝi parolas. Poste ĉiuj ordigas la desegnojn laŭ la sezonoj.




Foto 2. – Jean-Luc prezentas recepton por pretigi fiŝojn kun junko.



Foto 3. – Guy ŝatas superi la mondon.

## Puzlumu

Kiam gelernantoj sukcesas ludi aŭ ridigi la aliajn, ili ricevas puzlerojn, kiujn ili metas sur centran tablon (foto 3).

De tempo al tempo tiuj, kiuj deziras, konstruas la mond-mapon por ili.

## La Fantomo

Strange, la kastela fantomo invitis sin en la manĝo-ĉambron. Ĝi partoprenis en kelkaj ludoj, kelkfoje danĝeretaj (foto 4), kaj maskvestis sin per rafanetoj kaj peceto da pano (foto 5).



Foto 4.



Foto 5.

## Faru bondeziron

Ĉu vi scias ke, kiam du homoj samtempe diras la samajn vortojn, ĉiu povas elekti bondeziron? Tiamaniere, italino kaj franco krucigas iliajn etajn fingrojn antaŭ ol ili diros ĉu «krik» ĉu «krak» (laŭ la franca maniero). Se ili sukcesos denove diri samtempe la saman vorton, iliaj bondeziroj realiĝos (foto 6).



Foto 6.




Foto 7. – Kiu klaŭnas ?




Foto 8. – Kiu klaŭnas ?



Foto 9. – Aktoru vespere.



Foto 10. – Kantu vespere.

## Kantu ! Dancu !

Verkis Franjo.

« **K**ANTU ! DANCU ! » nomiĝas la aktivaĵo organizita inter la 14<sup>a</sup> kaj la 21<sup>a</sup> de julio 2007 en Greziljono.

La muzikan etoson de la jaroj 1960 ni deziris retrovi aŭ malkovri, ankaŭ aktualajn modernajn kantojn, la plej uzitajn kaj konatajn kantojn el la Esperanta viv-kulturo.

Ĉie muzike spiris la kastelo... Eĉ la ekstera necesejo estis la plej ŝatata loketo de Franjo por kant-provludi sole (pro akustiko kompreneble...) Nur estis problemo, kiam starante ŝi deziris prov-kanti la ŝtatan himnon !

Ni kunportis niajn sintezilojn, flutojn, gitaron por ĝojigi la staĝanojn. Ni lernigis *madison*, *country*-n, valsojn, grekan dancon, rumajn dancojn dank' al la helpo de Rodika, bretonajn kun Franjo...

Bonegan belan prezentadon ni havis por donaci, por danki ĉe la fino de la staĝo.

## Por « neniam akcenti fuŝe »

Verkis kaj fotis François Randin,  
svisa staĝano en Greziljono  
inter la 4<sup>a</sup> kaj la 11<sup>a</sup> de aŭgusto 2007.

**D**UM UNU semajno, la partoprenantoj – germanaj, hispanaj, rusaj, francaj, brazilaj kaj svisaj – povas plibonigi la nivelon de sia povmaniero paroli Esperanton per trinivelaj kursoj.

La unua estas speciale proponita al la komenkantoj. Tiel dek kursanoj – kiel Olivier, lernanto mia – sekvas la nuresperant-parolantan instruadon donitan de germanino. La unua kurso estas ankaŭ maniero studi per ludo kaj promenado.

En la dua, rusino instruas subtilaĵojn de nia lingvo. Per diversaj tekstoj, la studentoj povas legi kaj resumi, kion ili komprenas.

En la tria, kvin personoj deziris nur... babiladi inter si. Kiel kutime la francoj akcentaĉas kaj ne volas evoluigi sin. La instruistino rusa proponis korekti la erarojn de la gefrancoj... kiuj ne konsentis kaj klarigis ilian opinion tiel :

« Se iu korektas min, mi ne plu povas babili... mi tute mutas. »




Bonŝance, kelkaj nefrancoj bonparolantaj trovis momenton dum la vespero por paroli kaj por evoluigi nian nivelon.

Mi mem ricevis de du francinoj komencantaj la mendon, ĉu mi perlege trejnadigus ilin por :

« Neniam akcenti fuŝe » ... ili diris.

(Restas espero !)



La greziljonaj gevolontuloj estis tre akceptemaj kaj kuiris manĝaĵon bongustan dum la tuta semajno. Kurso de joko estis organizita ankaŭ por ĉiuj, kiuj interesiĝas.

La regiono tiel agrablas, ke ni biciklis multfoje tra la kamparo apud Baugé. Merkredo estas libera tago, do ni profitis de ĝi por vidi kastelojn de la Loire. (...)

Interese estas trapasi semajnon nur esperantlingvan en belega ĉirkaŭaĵo kastela. Mi invitas vin iri foje en Greziljonon, ĉar tre agrablas eniri Esperantion.

Tiun ĉi artikolon unuafoje publikigis en oktobro 2007 la reta informilo de la svisa « Laŭzana Esperanto Societo ».

# Unu semajno en Greziljono

Inter la 11<sup>a</sup> kaj la 18<sup>a</sup> de aŭgusto 2007.



**D**UM LA lasta somera semajno de 2007 en Greziljono okazis pluraj kulturaj aferoj.

Hispano Rafaelo Mateos instruis Esperanton al komencantoj per ludoj (p. 16).

Nina Korĵenevskaja proponis paroligan kurson por progresantoj (p. 20).


Dominik Bertrand gvidis praktikan seminarieton pri komputiloj, Linukso, presarto, enpaĝigo, ĵurnalisma verkado (p. 18).

Nina Korĵenevskaja proponis ankaŭ kroman aktivadon : teatron. Deziris partopreni pli da staĝanoj ol ŝi antaŭvidis, kaj eĉ komencantoj. Pluraj etaj teatraĵoj, por ĉiuj lingvaj niveloj, prepariĝis dum la semajno. Vendrede vespere ni do ricevis spektaklon tre riĉan kaj tre amuzan.

Kiel kutime ege laboris la sindonemaj volontuloj : Jeanne-Marie Cash, Geneviève Gourichon, Germaine Maitre, Louis Jeuland kaj aliaj. Novan dankon al ili.

La nombro de staĝanoj similas al tiu de la unua semajno : ĉirkaŭ 20 lernantoj, entute ĉirkaŭ 30 samideanoj. Do la Esperanta zumado daŭris en la kastelo ĝis la fino de la lastaj staĝoj.

Pro la komuna foto pozas Alain Chinal (1), Nina Korĵenevskaja (2), Marie-France Antoine (3), Franjo Levêque-Provost (4), Geneviève Gourichon (5), Juanita Turbillon (6), Germaine Maitre (7), Bernadet Dešanel (8), Marie-Reine Beaupère (9), Louis Jeuland (10), Denezza Cornichet-Lefol (11), Rafaelo Mateos (12), Maryse Desmaris (13), Jeanne-Marie Cash (14), Lucie Antoine (15), Guy Martin (16), André Fabre (17), Jean-Marie Sommacco (18) kun Lolo, Belén Rodríguez Macías (19), Pablo Busto González (20), Rose-Marie Sommacco (21), Joëlle Corroy (22), Olivier Duroselle (23).



# La Trafa Kurso de Rafaelo

Verkis kaj fotis Deneza  
inter la 12<sup>a</sup> kaj la 17<sup>a</sup> de aŭgusto 2007.

**R**AFaelo venis el Hispanio en Greziljonon por instrui la Esperantan lingvon. Kia bonŝanco por liaj lernantoj!

Rafaelo klaŭnas. Tre rapide kaj lude staĝanoj lernas Esperanton.

Kun sia pilko Ludoviko li vivigas la kurson kaj li alparolas siajn lernantojn.




Foto 1. – Rafaelo klaŭnas.



Foto 2. – Lernantino kun la pilko.

Per siaj gestoj, grimacoj kaj voĉnuancoj, kiujn ili ripetas, li stampas vortojn, frazojn kaj gramatikajn regulojn en la cerbojn.

Per tia tre aktiva metodo lernantoj rapide progresas bonhumore kaj ĝoje.

Kelkaj alvenis sen scii unu vorton de Esperanto, kaj post kvar tagoj ili jam parolas kaj komprenas multajn esprimojn kaj frazojn.

Foto 3. – Kun Rafaelo neniu plu forgesas la akuzativon dank' al la klaŭna metodo nomata « kataplan ».



Foto 4. – La klaso de Rafaelo.



# Staĝo pri komputiko

Verkis kaj fotis Bernadet Deŝanel  
inter la 12<sup>a</sup> kaj la 17<sup>a</sup> de aŭgusto 2007.

**D**UM LA lasta semajno de la somero en Greziljono kelkaj staĝanoj bone laboris kun Dominik per komputilo.

Kiel? Ĉu vi volas scii?

Komence ni lernis la teknikajn vortojn pri komputiko. Poste rapide ni aplikis la lernitaĵojn por krei dokumentojn. Ni enpaĝigis artikolojn per *Scribus* de Linukso.

Ni faris multajn erarojn, kiuj devigis nin refari! Sed iu diris: «Fari, defari, refari ĉiam estas labori.» Kaj La Fontaine diris: «Centoble sur la labortablon remetu vian manlaboraĵon, glatigu ĝin senĉese kaj ĝin reglatigu!»



Foto 1. – Dum la paŭzo serioze laboras per komputilo Dominik kaj Guy.

Tamen la rezulto estas bona: vidu tiujn paĝojn! Ni kreis ilin dum la staĝo.

Io estas certa: tiu kurso estas tre interesa kaj vi devus veni kaj partopreni al ĝi. Ĝis la venonta jaro!



Foto 2. – Ĉu vi ne ŝatus veni kun ni?




Foto 3. – Labora etoso.



Foto 4. – Deneza kaj Dominik preparas gravan dokumenton.



Foto 5. – Ne ĝenu la staĝanojn: Mariz, Mariren kaj Deneza!

# Lingva Estonteco de la homaro

Verkis staĝanoj  
en la kurso de Nina Korĵenevskaja  
inter la 12<sup>a</sup> kaj la 17<sup>a</sup> de aŭgusto 2007.

**L**Aŭ MIA vidpunkto la diversaj regionaj landlingvoj devas daŭre vivi. Oni povas pripensi, krei estontecon nur se ni nin apogas sur pasinteco. Oni devas konservi kiel trezoron la diversajn kolorojn de diversaj landoj por krei novan internacian ĉielarkon.

Muzike via Franjo.

Ĉu necesos ankoraŭ lingvoj post pluraj jarcentoj? Eble ni komunikos per telepatio. Ne plu eblus miskomprenoj, sufiĉus eĉ ne rigardo sed nur penso kaj niaj pensoj flugos tra la tuta mondo, ideale serĉante kaj trovante la ulon celitan.

Ĵuanita.

Vojaĝo inter landoj kreas samtempe bezonon de interkompreno per komuna lingvo kaj iom post iom bedaurinde malaperon de minoritataj lingvoj, limigitaj al malmultaj partoprenantoj.

Mi ŝatas la riĉecon de la lingvoj kaj esperas, ke apud komuna lingvo tamen ankoraŭ ekzistu multaj aliaj lingvoj.

Joëlle.

Mi pensas, ke post ducent jaroj multe da lingvoj aktuale parolataj ne plu estos uzataj pro la klimata ŝanĝo. Multe da uloj, kiuj ne plu povos vivi en suda parto de la mondo, devos vivi en pli nordaj

landoj. Ili devos uzi la lingvojn pli fortajn de la gastolandoj. La gesta lingvo povus eble helpi ilin (interŝanĝi kaj interparoli).

Rose-Marie.

Mi opinias, ke ne estus bone, se la lingvoj malaperus aŭ se nur unu lingvo superus la aliajn. Estus bone, se la homoj havus unu facile lerneblan lingvon ne nacian aŭ de eta nacio sen granda povo laŭ ekonomia, politika aŭ filozofia vidpunktoj.

Alia solvo – laŭ mi pli bona – estus adopti kreitan lingvon, kiu permesus al ĉiu homo lerni ĝin sufiĉe facile : tiu lingvo jam ekzistas ; oni nomas ĝin Esperanto. Ĝi bone funkcias de pluraj jardekoj kaj ebligas ĉiujn nuancojn de la homa penso, kaj ankaŭ efikas en la scienca kaj teknika kampoj. La lingvo de la gestoj laŭ mi ne kongruas pro diversaj kialoj.

Andreo.



Foto 1. – La klaso de Nina.

Delonge homoj revas facile komuniki. La *tour de Babel* (turo de Babelo) estas la simbolo de tiu problemo. La kolora diferenco de lingvoj estas riĉeco, sed ankaŭ barilo.

La estontuloj devos trovi manieron konservi la lingvan diversecon, sed faliĝi la barilojn. Ni cerbumu, niaj ideoj estos la estonteco!

Marie-France.

Ĉar ni grandege uzadas naturajn rimedojn, mi pensas, ke la nuna situacio similas al la lastaj momentoj de la romia imperio, ke nun estas la pinto de nia kulturo (Eŭropo).

En Nord-Ameriko, la distanco kaj la denseco de loĝantaro pli grandigas la aferon (malgraŭ la fakto ke ĉiuj parolas la anglan nuntempe). En Afriko kaj en Oceanio la situacio estas simila, ĉar kvankam la oficiala lingvo estas iu eŭropa lingvo, ekzistas multaj societoj, kiuj ne ĝin parolas.

Pablo.

Sed ne forgesu : oni nur povas imagi la estontecon sed verŝajne idoj de niaj idoj kreos novaĵojn, kiujn oni ne povas eĉ imagi nun. Do... la estonteco estos malsimila al niaj ideoj.

Olivje.

## Mia Brazilo

Verkis Francisca Calegari en 2005,  
denove prezentis en julio kaj aŭgusto 2007  
(uzante mapon, kiu ne aperas tie ĉi).

**B**RAZILo estas tropika lando, la plej vasta de Sud-Ameriko. Ĝi posedas multajn riĉaĵojn, mineralojn, kaj en ĝia grundo ĉio povas kreski.

La riverego Amazono estas unu el la plej longaj de la mondo. Ĝi havas multajn flankajn riverojn kaj ĝi trapasas la amazonan arbaron, kiu enhavas la plej grandan vivodiversecon de la mondo.

Nordorienta regiono ricevis influon de francoj (Maranhão estas ĉefurbo fondita dum la regno de Ludoviko la XIV<sup>a</sup>) kaj holandanoj (kiel Maurício de Nassau en Pernambuco). Ankaŭ okazis la mikso de indiĝenoj, nigruloj kaj blankuloj. Sklaveco okazis inter 1570 kaj 1888.

En sudon enmigris germanoj, italoj kaj poloj, malmultnombre svedoj, francoj, litovoj kaj hispanoj. Apartiĝas Rio Grande do Sul, kun



Foto 1. – Francisca ne nur parolas pri Brazilo, ŝi ankaŭ belege kantas brazilajn kortuŝajn kanzonojn.

ĝiaj kampoj, terkulturado, natura tradicio, ĉevaloj, vinberoj, vino, lignaĵoj, ledoj, muzikoj kaj vestaĵoj.

En sudoriento granda estis la miksado de gentoj. Do São Paulo koncentras diversajn industriojn, komercojn kaj agrikulturon. Oni rimarkas ĉefe japanojn kaj nun koreojn (komerco) kaj ĉinojn (industrio).

En São Paulo estas varma klimato. Kutimas 19 ĝis 27 gradoj kaj eĉ 32 ĝis 35 gradoj en decembro kaj januaro.

São Paulo akceptis homojn de tuta Brazilo kaj la tuta mondo. Ni havas ladvilaĝojn, sed ankaŭ ekzistas vastaj avenuoj, belaj parkoj, esplorado pri kuracarto (per plantoj), kaj mia urbo havas florojn kaj verdajn arbojn dum tuta jaro.

En februaro okazas karnavalo. Dum kvar tagoj la homoj multe ludas. Karnavalo estas tre fama festo en tuta Brazilo, kaj homoj el la tuta mondo partoprenas aŭ ĉeestas.

Fine de februaro kaj en marto venas pluvperiodo. Dum vintro (junio, julio, aŭgusto) ne multe pluvas. En du urboj neĝas dum vintro; la unua situas je 270 km de São Paulo (Campos do Jordão), la alia en Rio Grande do Sul (São Joaquim). Homoj de tuta Brazilo venas por vidi kaj senti la neĝon.

São Paulo senĉese vivas tage kaj nokte.

En Brazilo ni havas multajn Esperantistojn kaj klubojn aŭ asociojn!  
Vizitu mian landon!

Vi estas ĉiam bonvenaj!

## Funkciado de la greziljona batpumpilo

Verkis Guy Martin.

**D**ANK' AL Gi Geto la malnova greziljona batpumpilo denove funkcias. Ĝi estis konstruita de la firmao Bollée kaj instalita en la parko de la kastelo Greziljono ĉirkaŭ la jaroj 1930.

Tiaj batpumpiloj estis inventitaj antaŭ 1800. Oni povas trovi kelkajn similajn batpumpilojn en la regiono, ĉefe apud kasteletoj. Oni uzis ilin por akvumi parkon, ĝardenojn...



Foto 1. – Gi Geto montras la batpumpilon al Guy kaj Jean-Luc.

La ĉefaj avantaĝoj estas la funkciado sen elektro aŭ motoro, la relativa simpleco de la aparato. Tamen, ĉar oni konstruis multajn pumpilojn, la prezo estis alta kaj nun estas malfacile trovi pecetojn por ripari ilin. Des pli, ni povas danki Gi-n.





Foto 2. – Gi Geto publike prezentas la batpumpilon al staĝanoj.




Skemo 1. – Plej simpla modelo por klarigi la funkciadon.

Vidu la skemon 1. El la rivereto aŭ la rezervujo, iomete pli alta ol la bazo de la batpumpilo, la akvo fluas en enirtubon. La valvo 1 estas malfermita kaj la valvo 2 fermita. La akvo foriras tra la truo ĉirkaŭ la valvo 1.


Vidu la skemon 2. Poiome, la akvo puŝas la valvon 1. Pezaĵo preskaŭ ekvilibrigas la vekton, kiu per ferbastoneto suprenirigas la valvon ĝis la subita fermo de la truo.

Tiamaniere, la valvo batas la tubtruon.


Vidu la skemon 3. Tiu akvobato, konata laŭ la franca vorto *bélier* (virŝafo), produktas akvondon kiu malfermas la valvon 2.




Skemo 2.



Skemo 3.



Skemo 4.




Skemo 5.

Vidu la skemon 4. Pro la akvobato la akvo premas la aeron en la kloŝo.

Vidu la skemon 5. Pro la premo la valvo 2 denove fermiĝas.

Finfine, pro sia propra pezo, la valvo 1 kun sia ferbastoneto subeniras kaj malfermas la truon ĉirkaŭ si.

Reiru al skemo 1.



Fotoj 3 kaj 4. – En junio Gi Geto malmuntis, riparis kaj remuntis la batpumpilon.

## Hajkoj

Verkis greziljonaj staĝanoj  
en la kurso de Jean-Luc Kristos  
inter la 8<sup>a</sup> kaj la 13<sup>a</sup> de julio 2007.

**G**RIZAS ĉielo  
Ploras nubego  
Kaj mi en dormo-sako!

Jonglema Jean-Luc.

Dense pluvas pormomente  
Dise bluas tra nubeg'  
Jen la vivo dum somero!

Jonglema Jean-Luc.

Julio belus  
Se gajaj birdoj kantus  
Kaj suno brilus.

Gaja Guy.

Pluva vetero  
Forta ventego  
Hont' al la suno!

Ludema Lucie.

Sub griza ĉiel'  
Sur la humida herbej'  
La kor' enuas.

Fripona Franjo.

Roso perlas  
Sur ĝardena rozujo  
La raŭpo balzamas.

Melodia Marie-Noëlle.

Neniu nubo en la griza ĉiel'  
Mia koro sentas ventegon.  
Kie vi estas?

Feliĉa Francisca.



Foto 1. – La klaso de Jean-Luc.

## La Matena Enigmo

Verkis Guy Martin  
en julio 2006.

**M**IA FRUMATENA laborloko ne estas ordinara.  
Mi proponas gvidi vin. Do sekvu min.

Ni piediras en la freŝa aŭgusta aero, aŭskultante la bruetojn kaj flarante la parfumojn de nia tero. La kantoj de la birdoj, eĉ de la kokino, akompanas nin; ankaŭ kelkajn malagrablajn bruojn de aŭtoj aŭ ŝarĝaŭtoj ni aŭdas.

Post dek minutoj ni eniras en arbareton. Sub la branĉoj de la fagoj kaj kverkoj, ni paŝas sur padeto, evitante la rubusojn kaj urtikojn.

Fine ni ekvidas mian ŝtonan laborlokon.

Ĝi staras aŭ kuŝas en senarbejo. Ĝi estas ne tro alta, je unu metro, sed forta kaj longa je proksimume dek kvin metroj. Nek pordoj, nek fenestroj en tiu loko.

Kliniĝante ni povas transiri ĝian sojlon inter du ŝtonegoj kaj viziti ĝin. Fakte ni ne povas kune enriri, sed unu post la alia; tamen dek personoj povas resti en ĝi.

Mi proponas al vi iri sur mian laborlokon, ĉar ĉi-tie matene mi vere skribis tiun reklampaĝon. Ni salutas ĝin kaj demandas permeson grimpi sur ĝin, poste ni sidiĝas sur ĝiajn tre malnovajn ebenajn ŝtonegojn.

Pensante pri niaj prauloj, kiuj dormadas por ĉiam sub mia laborloko, ni povas rigardi la tagiĝon kaj lasi la unuajn radiojn de nia suno varmigi niajn korpojn.

Ĉu vi vidas la belan verdan pegon, kiu frapas per sia beko la branĉon? Kiel bela, kvietaj kaj ripoza estas mia frumatena laborloko!  
Ĉu vi trovis ĝian nomon?

## La Transa Enigmo

Verkis Guy Martin  
en julio 2007.

**M**I ĈIAM vivis sub ĉielo en Greziljono. Mi estas maljuna kaj iomete kurba; ne pro mia aĝo, sed pro mia unua rezisto.

Bedaŭrinde, mia najbaro iĝis senhoma loko. Mi ne plu vidas la homojn, kiuj vizitis ĝin. Mi nur memoras la feliĉajn tagojn, kiam mi miris iliajn belaspektajn gambojn.

Kiu mi estas?

Regularo por ludi:

La gvidanto unue laŭte legu enigmon.

Ludantoj, kiuj ne trovas la solvon, petu informojn sed nur per ĉu-demandoj: oni respondos aŭ per jes aŭ per ne.

Atentu: tiuj ambaŭ enigmoj validas nur en la greziljona regiono.

## Verku la Kulturajn Kajerojn

*Kial vi?*

Ĉar en niajn paĝojn

Ne venas komencantoj kun eminentuloj, ne instruistoj kun lernantoj,  
sed homoj kun homoj.

*Pri kio?*

Por la parto « Historio de kulturdomoj »:

Studu la (eĉ proksiman) pasintecon de via preferata kulturejo;  
Rakontu ĝin kiel eble plej neŭtrale, ne per opinioj sed per faktoj;  
Ne provu priskribi ĉion: elektu simplan temon, klaran atakangulon.

Por la parto « Kleriĝado »:

Klerigu nin per viaj fakaj scioj.

Por la parto « Distriĝado »:

Distru nin per rakonto originala kaj zorge konstruita.

Aŭ partoprenu nian anoncotan ludon.

*Sed ne pri kio?*

Ĉar ni celas kleriĝadon, emancipadon, ni nenion publikigu pri:  
politiko; religio; ekonomio; pseŭdoscienco...

Krome estos rifuzitaj:

jam konataj tekstoj; (plejofte) tradukaĵoj; (nepre) krudaĵoj.

*Kiel?*

Ĉe ni « verki » signifas: skribi, desegni, fotadi, komponi tuton...  
(eĉ novan kovrilpaĝon).

Sendu vian proponon al

Dominik Bertrand, 7, rue des Brullis, 77320 Jouy-sur-Morin, France

« nasf2008@orange.fr »

aŭ al « kulturaj-kajeroj@googlegroups.com »